ilei


Driemaandelijks tijdschrift. Afgiftekantoor: Antwerpen X.
ISSN 1013-2031

Jarkolekto 29 - trimonata

3/99

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Redaktoro:
Jozefo Németh

Vicredaktoro:
Katalin Smidéliusz

Kunlaborantoj:
Stefan MacGill,
Johano Kirsch,
Françoise Noireau,
Atilio Orellana Rojas,
Franz-Georg Rössler

ENHAVO

La 33-a ILEI-Konferenco (GBEGLO, CIBULEVSKIJ) 1
Rezolucio de la Konferenco 5
Decidoj de la Komitatkunsido en Karlovy Vary (S. MACGILL) 6
Biografieto de Boo Mee Kim-Linblom 6
Maŭro LA TORRE: *Multaj klasoj – unu kvazaŭlernejo* 7
Rudolf FISCHER: *Responde al "Propede...kio?" de Renato Corsetti* 10
Dimitar HAGIEV: *Eseo pri Esperanto laŭtlegita antaŭ klaso* 12
*Nian karan al la infanoj (*Valdas BANAITIS*)* 12
Ulrich MATTHIAS: *Instruistaj seminarioj ĉe popolaj altlernejoj* 13
Por via notlibro (LA TORRE, MALEZIEUX-HUNNINCK, IEI, RAUHAMAA) 15
Recenzoj (Stefan MACGILL, Ulrich MATTHIAS) 20
El la landoj kaj sekcioj (AL, BA, CN, FI, FR, DE, ES, HU, IR, IT, YU, HR, NP, NO, PL, SE, UA, US, UZ, ZW) 21
El niaj metiejoj
LI WEILUN: *Rolo de ludoj en instruado* 32
La sorto mokas (Dieter BERNDT) 34
Redakciaj informoj 36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Terza Universitá di Roma, Via del Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel. +39-06-4957805, fakso: +39-06-4452642. <m.latorre@uniroma3.it > *Interlernejaj projektoj, komunikiloj, terminaro, reprezentado.*

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, HU-2030 Érd, Hungario. Tel. +36 23 364 198. <stefan.macgill@galamb.net> *Lerniloj, komunikiloj, eldona agado.*

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag. Tel. +31 70 355 6677, fakso: +31 70 358 4422. <iei001@worldonline.nl> aŭ <ilei@esperanto.nu> *Membraro, ekzamenoj.*

Vicsekretario: Jennifer Bishop. 39 Hill Street, Hawthorn, AU-Victoria 3122, Aŭstralio. Tel. +61 3 9818 7358, fakso: +61 3 9905 3668. <esperanto@education.monash.edu.au> *Lernejoj, konferencoj, gimnazio.*

Kasisto: Boo Mee Kim-Linblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge; tel. +46 8 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

Membro: Carla De Lorenzi, via Boston 65, IT-10137 Torino, Italio. Tel. +39 011 390 787. *Trejnado, lerniloj.*


Membro: Antonio Leoni de Leon, 1 rue Chandieu, CH-1202 Gèneve, Svisio. Tel. +41 22 734 2996. <katina.de-leon@ties.itu.int> aŭ <leoni8@etu.unige.ch> *Trejnado.*

LA 33-a ILEI-KONFERENCO

De la 7-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1999 okazis en KARLOVY VARY (Ĉeĥio) la 33-a ILEI-konferenco. Ĝin partoprenis 52 esperantistoj el 22 diversaj landoj reprezentantaj ĉiujn kvin kontinentojn. La tagoj konferencaj estis ne nur laboraj sed ankaŭ iom distraj, kio ebligis al ĉiuj partoprenantoj ĝui la etoson. La kvin enskribiĝintoj (el kvin landoj) ne partoprenintaj la konferencon, ties ĝuintoj kaj aliaj esperantistoj interesiĝantaj pri la agado de ILEI povas, tra sekvaj linioj, vidi filmon de la aranĝo.

Post longa vojaĝo perbusa, proksimume seshora, la konferencanoj, kiuj jam partoprenis en la UK, atingis la kongresejon, kiam devus jam komenciĝi la interkona vespero. Tuj post la vespermanĝo, ĉiuj konferencanoj ricevis la dokumentojn pri la partoprenado en la konferenco. La tralego de la konferenc-libro montris du ĉefajn partojn de la programo, kion pruvis la efektivigado de la programeroj en la sekvaj tagoj. Ĉiu el la du partoj labora kaj distra allogis multajn konferencanojn.

La prelegoj "Instruo de la lingvo kaj de gramatiko" de Geraldo MATTOS la prezidanto de la Akademio de Esperanto, "Projekto Interkulturo" de la ILEI-



Unu el niaj ekskurs-celoj: la kastel-palaco de Loket

prezidanto Maŭro LA TORRE, "Uzo de vortaroj en la instruado" de Ilona KOUTNY, "Netradicia lernolibro de Esperanto" de Petro CHRDLE, "Antonimoj kaj falsaj sinonimoj en Esperanto" de Lawrence MEE kaj "Pasporto al la tuta mondo" de L. HARMON klerigis la konferencanojn, kiuj vere deziris ion lerni dum la aranĝo de ILEI. La trejnaj sesioj "Eduko al paco" de Mireille GROSJEAN, "Komputilaj helpoj al la instruado" de Márta KOVÁCS kaj "La fremdeco en ni: ekkoni la antaŭjuĝojn kaj ilin perlabori" de Sabine TRENNER lernigis al la partoprenantoj la regadon de konfliktoj. Ne forgesindas la prezentaĵoj de Ton VERWOERD: "Instruhelpiloj" kaj de Mihai TRIFOI: "Kiel naskiĝis nova sperto?".

La CSEH-metodo devigis kelkajn konferencanojn plulerni kaj ekzameniĝi: C-seminario, ekzamenoj B kaj C pri la CSEH-metodo okazis. Ĉiuj tri kandidatoj sukcesis la B-ekzamenon, kaj ĉiuj kvar kandidatoj la C-ekzamenon.

La komitato kaj la estraro de ILEI ne estis senlaboraj. Okazis kunsidoj komitataj dum 12 horoj kaj estraraj dum ses horoj. Do preskaŭ ĉiutage tiuj instancoj de ILEI kunsidis por pripensi la evoluigon de la asocio. Akcepto de ILEI-sekcioj en Togolando kaj Katalunio kaj elekto de nova kasisto de ILEI estas inter la decidoj faritaj. Post pli ol dek sep jaroj da financaj laboroj por ILEI, Bertil ANDREASSON retiriĝis, cedante la lokon al samloĝlandanino KIM-LINDBLOM Boo Mee.

La promeno tra la banloka centro de Karlovy Vary, du aliurbaj ekskursoj, baniĝo en la baseno kun termala akvo, videofilmo pri tradiciaj ceremonioj en Togolando, loterio kaj kultura vespero ebligis al la konferencanoj iel distri sin post longaj horoj da laborado. En Loket la ekskursanoj povis vidi iaman kastel-palacon reĝan, kaj en banurbo Mariánské Lázně, la muzikan fontanon. Ne pretervidita estu la loterio, kiu enspezigis 3500 ĉeĥajn kronojn al la kaso de ILEI kaj ricevigis diversajn valorajojn al la partoprenantoj.

Kvankam distingiĝis du partoj en la programo, oni povas tamen noti, ke estas iom malfacile taksi iujn programerojn laboraj aŭ distraj. Tiel okazis pri la prezentadoj de Mattos, La Torre, Grosjean, Kovács, Trenner, Chrdle kaj Verwoerd, kiuj tiom interesis la homojn pri siaj aferoj, ke la etoso estis ege plezurdona. Flanke, la tre grava temo "Antonimoj kaj falsaj sinonimoj en Esperanto" estas prezentita en etoso iel dormiga.

Simile, la C-seminario, almenaŭ en sia unua sesio dormigis preskaŭ ĉiujn partoprenantojn. La rapideco en la ekzamenado kaj publikigado de la rezultoj de la ekzamenoj B kaj C kontraŭas la admonon de la prezidanto kaj sekretario de IEK, kiu postuladas, ke rezultoj estu publikigitaj multajn tagojn post la ekzamenado. Jen ili mem surtretas tiun regulon. Eble ILEI devus havi kvazaŭ-

inspektorojn por kontroli kiel okazas tiuj seminarioj C nomataj METODIKAJ kaj la kurso B pri CSEH-metodo kaj ankaŭ la ekzamenoj. La prezento Harmon havis karakteron ankaŭ reklaman, kio ege interesis la partoprenantojn pri la nova instruilo "Pasporto al la tuta mondo".

Tute aliajn menciojn havas la malfermo kaj fermo de la konferenco. Dum la unua, kiun prezidis la prezidanto de ILEI, la konferencanoj ekhavis superrigardon pri la tuta aranĝo, kaj aŭdis salutvortojn de la estraro de UEA.

Sub la gvidado de la vicprezidanto Stefan MacGILL fermiĝis la konferenco. Raporto pri la konferenco, publikigo de la rezultato de la ekzamenoj B kaj C pri la CSEH-metodo, dankvortoj al la organiza komisiono, kaj sciigo pri la konferenca rezolucio estas kelkaj el la eroj de tiu ferma ceremonio. La precipa punkto de la rezolucio estas "regado de konfliktoj": ILEI proponas, ke estu enkondukita en lernejojn la lernado pri "regado de konfliktoj".

Por agrabligi la etoson, folklora grupo de la urbo Karlovy Vary prezentis muzikon kaj dancon ĉeĥecajn, dancigis la konferencanojn, kaj finfine amuzis ĉiujn Stefan per siaj spritaĵoj kaj Steve WAGENSELLER per siaj kantoj.

ILEI estas vere tutmonda organizaĵo. La partopreno de esperantistoj el ĉiuj kvin kontinentoj en la konferenco atestas pri tiu tutmondeco, kaj samtempe devigas la gvidantojn de la ligo vere kunlabori kun ĉiuj tra la mondo, kaj provi demokratiigi la instruadon de Esperanto. La 33-a ILEI-konferenco jam fariĝas historiaĵo.

Kvankam plensukcesa, tamen ne mankas malglatajoj: ekzemple: samtempeco de pluraj programeroj, ĉiuj partoprenindaj; metodika seminario en ĉambro sen tabulo por skribi kaj sen lecionoj antaŭe preparitaj de la seminarigvidanto, ktp. Nenio dubigas, ke la 34-a ILEI-konferenco estos eĉ pli sukcesa ol tiu ĉi. La organizantoj certe uzos la spertojn de la pasintaj por plibonigi la venontajn.

GBEGLO Koffi

Noto: La Cseh seminario estas organizata de Internacia Esperanto-Instituto, al kiu ILEI laŭ interkonsento disponigas lokon en la konferenco. Sed IEI estas sendependa de ILEI kaj ĝiaj ekzamenoj, do ne estas devigata respekti iliajn postulojn aŭ rekomendojn.

La konferenco per okuloj de observanto

(elĉerpajoj el pli kompleta raporto)

Min persone pleje impresis la prelego de Geraldo MATTOS el Brazilo "Instruo de lingvo kaj instruo de gramatiko" kaj prezento de aktiviga programero de Sabine TRENNER el Germanio. Kompreneble, tio ne signifas, ke la ceteraj prelegoj aŭ programeroj estis maltaŭgaj por tiom impona Konferenco.

Ankoraŭ en 1967 mi estis partoprenanta Internacian Pedagogian E-Seminarion, en la hungara urbo Szeged. Tie inter la instruistoj, kiuj spertigis la kursanojn pri la historio de la E-movado, E-literaturo kaj metodiko estis István Szerdahelyi. Mi plezure vizitadis liajn lecionojn kaj ĝis nun bone ilin memoras. Komparante, mi povas konstati, ke la tiama Seminario estis pli riĉa kaj rezultodona ol la nuna. Sed tiu ĉi Konferenco donis jenan pozitivan rezulton: ĉiuj 4 pretendantoj pasi C-ekzamenon, sukcesis tion fari. Tio estis reprezentantoj el Hispanio, Francio, Usono kaj Litovio. Ni nur povas aplaŭdi al kresko de la vicoj de Cseh-instruistoj!

Plie pri la aktiviga programero de Sabine, kiun mi komence opiniis ordinara prelego. Mi estis ĉarmigita pri la enhavo de tiuj "lecionoj", pri aktivigo de ĉiuj ilin partoprenintoj, pri neordinara etoso dum la aranĝoj.... Kaj jen estas opinioj pri tio de esperantistoj, aktive ĉeestintaj:

- Se la Konferenco ne havus similajn programerojn, ĝi multon perdus;
- Similaj aranĝoj (programeroj) amikigas la ĉeestantojn;
- Esti en simila medio signifas trovi novan Patrion!
- Mi opiniis, ke du sinsekvaj prelegoj povos esti tedaj, feliĉe mi eraris!
- Anstataŭ ne okazinta interkona vespero, ni efektivigis interkonan aranĝon dum tiu programero...

Ŝatus mi substreki ankaŭ tre altan lingvan nivelon de la partoprenintoj. Unue, preskaŭ tute ne estis aŭdeblaj "krokodilaj" paroloj. Kaj ĉe parolantoj preskaŭ ne estis sentebla iu nacia akcento - oni apenaŭ povis diveni, el kiu lando venis tiu aŭ alia esperantisto. Kaj jen estas ankaŭ esprimo de domaĝo, ke la Konferencojn ne partoprenas esperantistoj el tiel nomataj nepagipovaj landoj. Sed ni esperu, ke tiu situacio daŭros ne longe...

Dmitrij CIBULEVSKIJ
Ĥarkiv, Ukrainio

Rezolucio de la Konferenco

Ĉi tiu dokumento, akceptita de la Komitato, estas du-parta. La unua parto turnas sin al la ekstero, la dua parto al esperantistoj.

"La 33-a konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kunveninta kun 52 partoprenantoj el 22 landoj de la 8-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1999 en Karlovy Vary, Ĉeĥio, traktinte por pacedukado i.a. metodojn regi (grup)egoismon, timon, agresemon kaj konfliktojn,

forte rekomendas al Unesko, registaroj kaj aliaj decidaj instancoj

progresigi la instruadon kaj utiligon de la egalrajtiga Lingvo Esperanto por internaciaj kaj interetnaj rilatoj,

enkonduki en la instruadon kiel fiksan programeron lecionojn pri konfliktoregado,

instigi al produktistoj de (kinaj, televidaj, videaj, interretaj) filmoj krei kaj disponigi filmojn pri la regado de konfliktoj por kontraŭpezi la inundon de filmoj prezentantaj superfluan perforton

stimuli ankaŭ filmfestival-estrojn en 2000 aparte pacpremii filmojn konvinke satirantajn falsan heroismon kaj konsciigantajn pri konfliktregaj metodoj, eventuale memore pri tiaj pacistoj kiel Anatole France, Gandhi, Martin Luther King

invitas esperantistojn individue aŭ grupe


a) **kontribui** al la pacigo de la mondo tradukante kaj publikigante verkojn traktantajn metodojn kiel regi konfliktojn, kaj mem praktikante tiujn metodojn,
b) **subteni** la ILEI-projekton Interkultura Edukado, varbante por ĝi pliajn lernejojn en evoluintaj landoj, mem interagante kun partoprenantaj grupoj - precipe en landoj aŭ regionoj ekonomie malpli bonfartaj - per monhelpo, materialoj aŭ konsiloj laŭ la bezonoj."

La Komitato de ILEI en Karlovy Vary:

- Akceptis du novajn sekciojn en Togolando (la unua en Afriko) kaj Katalunio.
- Akceptis du novajn honorajn membrojn: Cathy Schulze (Usono) kaj Claude Gacond (Svislando).
- Akceptis la ĝeneralajn kaj financajn raportojn pri 1998 kaj senŝarĝigis la tiaman estraron.
- Re-elektis senopone estraraninon Jennifer Bishop.
- Elektis novan kasiston: Boo Mee Kim-Lindblom (adreso, p.2).
- Akceptis ligan buĝeton por 2000 kune kun detaligo por "Juna amiko".
- Akceptis estraran proponon, ke ekde 1 jan 2000, financaj dokumentoj de la ligo aperu unuavice en eŭroj.
- Fiksis kadre de tio novajn kotizojn, distingante pli klare inter la A- kaj B-landoj (vidu la kvaran kovrilon).
- Akceptis principe restarigon de gvida komitato por IPR por erigi kaj pritaksi fakajn artikolojn.
- Akceptis la lokon kaj daton de la sekva konferenco (kovrilo 4) kaj aŭdis pri planoj por 2001.
- Ricevis raporton, ke ILEI estas nun jure registrita senprofitcela asocio en Nederlando.

Smg

Biografieto de Boo Mee Kim-Lindblom:



- estas naskita en la jaro 1941 en Koreio
- post universitata studado pri koreaj lingvoj kaj literaturo fariĝis instruisto en mezlernejo en 1962
- en 1964 esperantistiĝis kaj fondis rondon Stelaro, kiu bone aktivis en Seulo
- fariĝis E-instruisto (1966) kaj gvidis E-kurson en Y.M.C.A. kaj ankaŭ por lernantoj inter 13-15 jaraj
- estis sekretario de Korea E-Instituto (1967-72)
- pli studis pri koreaj lingvo kaj literaturo, pedagogio kaj ricevis rajton kiel gimnazia instruisto (1978-80)
- plue esploris en sama fako kaj fariĝis magistro en Yonse Univ. En Koreio
- postan jaron studis librotenadon en New Brunswick Comm. College en Kanado (1983)
- daŭre studis librotenadon en Stokholmo en Svedio (1987)
- de 1986 ĝis nun instruas en baza lernejo kaj gimnazio
- en Stokholma universitato studis pri interlingvistiko (1991)
- inter 1993-98 instruis E-on por lernantoj 11-14 jaraj
- estrarano de SEF (1998)
- ricevis diplomojn kiel instruisto de paperfaldado por komencantoj (1997) kaj por progresantoj (1998)

Maŭro La Torre

Multaj klasoj - unu kvazaŭlernejo

Karaj gekolegoj,

antaŭ unu jaro, en Montpeliero (Francujo), dum la simpozio (kolokvo) *Lingvopolitiko kaj interkultura edukado*, ni lanĉis la lernejan eduk-projekton *Interkulturo*. Laŭplane, la pasinta sezono estas dediĉita al la pretigaj laboroj: varbado de klasoj, konstruo de la interreta *kvazaŭlernejo*, serĉado de kun-laborontoj, kontaktado de Unesko-instancoj por oficiala aprobigo de la projekto, fortikigo de la kunordiga grupo.

Ĝis la mezo de julio jam aliĝis pli ol 60 klasoj el pli ol 20 landoj. Rimarku ke ne temas pri la kutimaj okcidenteŭropaj landoj, kiuj apenaŭ aperas, sed male, temas precipe pri Orienta Eŭropo, Afriko, Ameriko, Azio kaj Oceanio.


En iu *servilo* (komputilo rete konsultebla) laŭgrade estas pretigata la "kvazaŭlernejo", tio estas la elektrona ŝelo, kiu gastigos la diverslandajn klasojn, kvazaŭ ili renkontiĝus ie sub unu sama tegmento. Inter la aliĝintaj klasoj multaj ne jam havas ret-aliron en la lernejo mem, sed ili provizore atingos la kvazaŭlernejon tra la ret-adreso de instruisto (aŭ de klasano), aŭ eĉ per nura tradicia papera poŝto.

Aliflanke, dum la pli frua vintro (norda vintro '97/98') per la helpo de ILEI-aktivuloj ni starigis en Interreto TTT-paĝaron pri *e-lernejoj* (mallonga esprimo por ĉiugradaj lernejoj, kie okazas io ajn pri esperanto, eĉ se nura ĉeesto de esperanto-parolanta instruisto). Tiu paĝaro konsistas el tabeloj, laŭlandaj kaj laŭtipaj, kie registriĝis ĉirkaŭ 400 lernejoj, tre proksimume jene distribuitaj:

	kun e-instruado	kun nura ĉeesto de e-parolanta instruisto	*laŭŝtupaj sumoj*
bazaj kaj mezaj lernejoj	100	100	*200*
universitatoj kaj altlernejoj	100	100	*200*
laŭpenetraj sumoj	*200*	*200*	*400*

Kvankam la datumoj ja bezonus revizion kaj aktualigon, supozeble la subtrahoj pro ĉesoj kaj la adicioj pro novaj ekestoj pli-malpli balanciĝos, esence havigante la samajn rezultojn. Do ni havas rondnombre almenaŭ centon da klasoj, kie oni instruas la Internacian Lingvon (aŭ iel traktas pri ĝi), plus alia cento da registritaj instruistoj e-kapablaj (sed mi taksas ke ili estas almenaŭ kvaroblo de tio).

Ekstermovada preterpasanta naivulo, komprenanta niajn celojn, rajtus demandi: kial tiu tuta cento da e-koncernataj klasoj ne aliĝas en la mondan Kvazaŭlernejon "Tibor Sekelj"? Eble en multaj kazoj sufiĉus informi kaj inviti la respektivajn instruistojn. Verŝajne en kelkaj aliaj kazoj necesus aldoni iom da konvinkado kaj subtenado (morala kaj materia!). Sed ĉu ne indus klopodi? Kompreneble tio postulas - flanke de landaj organizajoj de ILEI kaj UEA - iom da pacienca kontaktado, korespondado kaj flegado.



Poste, konsiderindas la ceteraj centoj da e-parolantaj instruistoj. Por ili penseblas du kanvasoj:

- iuj, eksciante kaj ekkomprenante la projekton Interkulturo, povus ekpensi proponi al siaj kolegoj kaj estroj ian partoprenigon en ĝi de siaj klasoj;
- aliaj (multaj el kiuj estas ne plu dejorantaj instruistoj) povus iĝi senklasaj kunlaborantoj de la kvazaŭlernejo, kontribuante per inter-kulturaj materialoj, tradukoj, menciado de interesaj utilaj ekzistajoj, ktp.

Nuntempe ILEI, la *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*, estas potenciale granda asocio (vidu kiom da instruistoj agas en esperanto-movado, ofte kun respondecaj funkcioj, kaj aldonu la milojn da neprofesiaj esperanto-instruantoj), kun objektive malforta organizajo! Ĝi estas tiel malforta, ke multaj e-instruistoj kaj e-instruantoj tra la mondo, eĉ ne scias pri ties ekzisto, aŭ, kvankam sciante, ne konsideras sufiĉe utile membriĝi en ĝi. Eble prave. Sed ĉu ni povas renversi tiun tendencon?

Ĉu tiu diabla inventajo de la Kvazaŭlernejo ne povas esti ankaŭ okazo por:

1) proponi konkretajn (kaj interesajn) farendajojn al multaj *marĝeniĝintaj esperantistoj*;
2) aliri *neesperantistajn instruistojn kaj lernejestrojn* kun diskutbazo, kiu povas interesi ilin, eĉ sendepende de esperanto.

Ne miskomprenu min. Mi ne volas detrui la ĝisnunajn valorajn agadojn de ILEI-respondeculoj; male mi volas apogi ilin per vastigo de nia bazo. Ni pensu ekzemple pri niaj periodajoj. *Juna Amiko,* nia plej disvastigita organo por e-lernantoj, kiu – nur en Brazilo – havas signife pli da legantoj ol la tuta ILEI-membraro, estos ankaŭ la oficiala organo de Projekto Interkulturo, ankaŭ por kunligi la laboron de la klasoj en Sekelja Kvazaŭlernejo kun tiu de la ceteraj e-klasoj en la mondo. Krome aliaj gazetoj, interesaj por niaj klasanoj – laŭ la aĝoj ekde la *Krokodileto* ĝis *Kontakto* – estos iel atingeblaj de la kvazaŭlerneja *Gazetejo*. Memkompreneble IPR (*Internacia Pedagogia Revuo*) estos la plej ŝatata revuo por la Sekeljaj instruistoj. Krome ne forgesindas ke en la nuna septembro ekmarŝos la interreta diskutlisto *e-ins* (Esperanto-Instruado), je dispono ne nur de ĉiuj e-instruantoj, sed eĉ de ĉiaj interesiĝantoj pri problemoj de e-instruado (aŭtoroj, redaktistoj, instru-teknologiistoj, ktp.).

Simile estas forte koncernata nia lernil-produkta kaj eldona agado. Niaj valoraj fakuloj (Stefan MacGill kaj Mónika Molnár) estas fulmrapide verkantaj lernokajeran serion, specife taŭga por 8-jaruloj *(Okulo)*.. Aliaj lernomaterialoj jam ekzistas paperaj (kia la 3-voluma serio *Tendaraj Tagoj*, aŭ la vortareto *Ovo*), aŭ filmaj (kiaj *Mazi en Gondolando* kaj *Pasporto al la tuta mondo*). Sed aliaj bonvenus, kiel ekzemple bazaj vortaroj (vortoftecaj).

Espereble, per relanĉo de sistema lerneja instruado de esperanto, ankaŭ la kunmetado de niaj konferencoj kaj seminarioj iĝos laŭ enhavo kaj strukturo pli profesieca kaj celkonforma.

Cetere, ĝuste nun ni diskutas pri la estonteco kaj havindeco de la tradicia ILEI-*gimnazio*: ĉu transformi ĝin al *staĝo*? ĉu kunligi ĝin kun IIK (*Internacia Infana Kongreseto*) aŭ kun REF (*Renkontiĝo de Esperantaj Familioj*)? Sed ĉu tia staĝa klaso ne jam estas escepta ekzemplo de (kvazaŭlerneja?) klaso, kies klasanoj reale kunestas, eĉ se nur dum unu semajno?!

Konklude, ĉu interkultura edukado estos samtempe nova "interna ideo" kaj inercirado por la ILEI-a lokomotivo?

NdlR – Jen sekvu interesa temo, kiun IPR (re)lanĉis en numero 97/4, kaj kiu aperis poste ankaŭ en Ret-Info, trovante grandan eĥon ankaŭ tie:

Responde al "Propede...kio?" de Renato Corsetti

(el Ret-Info)

La artikolo de Renato Corsetti estas tre informiva kaj valora por ĉiu Esperanto-aktivulo. Grandparte ĝi estas ankaŭ trafa el mia vidpunkto. Tamen mi ŝatus iom aldoni, korekti kaj komenti.

1) "Mitoj" en E-propagando

Lastatempe iĝis modo, paroli pri "mito" de Esperanto-propagando, se iu aserto ne estas absolute vera. Ekzemplo de s-ro Corsetti: "Esperanto estas propedeŭtika" estas mito, ĉar "Esperanto ne estas propedeŭtika por ĉiuj lingvoj en ĉiuj situacioj." Se oni postulas tian gradon de ĝenerala vereco por ĉio, kion ni rajtas diri varbante por Esperanto, tiam "Esperanto estas lernebla lingvo" ankaŭ estas mito, ĉar la negativa formo "Ne ĉiu en ĉiu situacio kapablas lerni Esperanton" estas sendube vera.

Konkludo: Ĉiu devus scii, ke iuj varbaj asertoj pri io ajn neniam estas ĝenerale validaj aŭ science pruvitaj aŭ pruveblaj. Se ni volus limigi nin (kaj ĉiujn ordinarajn aktivulojn, kiuj ne estas lingvistoj) al lingvike sendubaj faktoj, prezentante tuj ĉiujn seojn kaj sedojn al iu surstratulo antaŭ nia informstando: ni (malprave!) nur rikoltus nekomprenon kaj mokojn.

2) Ĉu propedeŭtika valoro de Esperanto por Germano, lernante la Anglan?

S-ro Corsetti ne vidas tian valoron (kaj la leganto emas ĝeneraligi, ke tiu do ne ekzistas kaj eble ankaŭ ne en multegaj aliaj situacioj). Tiu demando meritus plian studadon. Tamen spontane mi menciu kelkajn aferojn, kiujn havas Esperanto kaj la Angla kontraste al la Germana:

- neniu "Auslautverhärtung" (prononco de "t" anstataŭ "d" ktp. silabofine)
- neniu gramatika genro
- markitaj adverboj, derivitaj de adjektivoj
- vorttrezoro: pli da romanidaj vortoj (kiujn do oni tuj rekonas en la Angla danke al Esperanto)

Certe oni trovus multe pli.

3) Ĉu Esperanto havas ĝeneralan, propedeŭtikan valoron?

S-ro Corsetti prave diris, ke jes, ĉar ĉiuj lingvoj havas tian. Ĉu tamen Esperanto havas ion apartan, kontraste al (multaj) aliaj lingvoj? Mi asertas, ke jes! Mi nur skizas mian rezonadon: Kiam oni lernas la unuan fremdan lingvon, tio okazas surbaze de la gepatra lingvo. Propedeŭtika lingvo helpas, analizi la lingverojn de la gepatra lingvo, por poste kompreni, kiel ili realiĝas en la fremda lingvo. Rigardu ekzemple la vortklasojn. Por multaj lingvaj paroj Esperanto povas esti interpretata kiel pli ĝenerala koncepto por ambaŭ lingvoj. En tiuj situacioj – normalkaze – Esperanto havas pli grandan propedeŭtikan efikon ol iu alia lingvo. (Esceptoj ekzistas ĉe tre similaj lingvoj kiel la Ĉeĥa kaj la Slovaka.)

Mi jes konscias, ke la supra skizo validas pli por la gramatiko ol por la vorttrezoro kaj ke – teorie – povas ekzisti alia ĝenerala koncepto (ekz. sen vortklasoj) de planlingvo, kiu estus pli efika propedeŭtika lingvo, por lerni kiel Japano la Indonezian. Sed tio estas pli granda mito ol ĉio, kion ni tiuteme diradas pri Esperanto.

4) Esperanto kaj aliaj kandidatoj

Aliaj kandidatoj de propedeŭtikaj lingvoj estas nuntempe la Latina kaj la Angla. Mi asertas, ke kompare kun ili Esperanto havas pli altan efikon (vidu 3). Ke, eble, Nederlandano profitas pli per la Angla ol per Esperanto lernante la Germanan, tio estas pruvenda, laŭ mi duba.

Resume: Varbaj sloganoj por Esperanto estas neeviteble simpligaj. Ĉiuj tiaj asertoj havas esceptojn, ne estas science pruvitaj kaj validas kutime nur laŭgrade. Tamen, kompare kun la Angla kaj la Latina mi asertas – ĝeneralan – superecon de Esperanto kiel propedeŭtika lingvo.
Tial mi pluasertas: "Esperanto havas propedeŭtikan valoron."

Rudolf Fischer, <fischru@uni-muenster.de>

Dimitar Hagiev

Eseo pri Esperanto laŭtlegita antaŭ klaso

En februaro de 1998 la instruisto de angla lingvo, s-ro Iskren Iskrov en la gimnazio Aleksander S. Puŝkin en Sofio donis al la gelernantoj de la 9-A klaso kiel hejme farotan taskon verki eseon pri la ŝatata de ili lingvo. Mia nepino Veronika V. Haĝieva sciigis la instruiston, ke ŝi deziras verki eseon pri E-o, aldoninte, ke ŝia avo scipovas tiun ĉi lingvon. La instruisto bonvenigis ŝian proponon. La sekvan tagon ŝi laŭtlegis antaŭ la klaso anglalingvan eseon pri E-o.

En la eseo, en kvar tajpitaj paĝoj, preparita miahelpe, ŝi prezentas mallonge la historion de la ideo pri la kreo de artefarita internacia lingvo. Poste ŝi rakontas kiel D-ro L.L. Zamenhof venis al la ideo inventi sian internacian lingvon. Plue en la eseo estas donitaj la karakterizaj trajtoj de la lingvo kaj informoj pri ties diverscela aplikado.

Por pruvi la taŭgecon de E-o por verkado de beletra literaturo Veronika montris al la aŭskultantoj la *Antologion de Esperanta poezio*, la novelkolekton de la eminenta ĉina verkisto kaj pensulo Lu sin kaj la E-an tradukon de la romano *Bofilino* de la elstara bulgara verkisto Georgi Karaslavov. La eseo estis aŭskultita kun granda intereso kaj la montro de la libroj ege impresis la gelernantojn. La instruisto prenis la eseon.

Tiu ĉi okazo generis ĉe mi la ideon, ke la instruistoj esperantistoj de etna kaj fremdaj lingvoj povas doni al la lernantoj taskojn verki eseon pri E-o aŭ pri la neceso de komuna neŭtra lingvo por interkomunikado de homoj parolantaj malsamajn lingvojn. Ja kiel konate, en Korea respubliko delonge estis enkondukita en la programon de la korea lingvo por la sesa klaso leciono pri E-o. La landaj E-asocioj devas starigi al si la taskon klopodi por la enkonduko de leciono pri E-o en la programon de la etna lingvo por la respektiva klaso de la elementaj lernejoj kaj en la programojn de la instruistaj institutoj.

Dimitar Hagiev, Komplekso Javorov, bloko 4, BG-1124 Sofio, Bulgario

Nian karan – al infanoj!

La sola planlingvo, nur unu projektomilono, kiu efektiviĝis kiel viva lingvo... Ja la ĉefa fonto de tiu relativa sukceso estis ĝia origino – intuicia verko de genia infano. Tamen en la socio de plenkreskuloj ĝi restis marĝena fenomeno.

Eble la plej perspektiva vojo en la socion kondukas tra la animo de infano?

Esperanto rolu kiel infana lingva ludilo – la plej potenca varbilo, kun sia tuta propedeŭtika povo, senfina provizo por improvizo. Rimarku, kiel beba komencanto amas kree ĵongli kun sia denaska – tamen en la lernejo neniu fremda lingvo, neniu ties instruisto permesas tion. Esperanto ebligas fari lernadon de alia lingvo rea spontanea ludo, kaj oni ankoraŭfoje povas lerni senpere ludante pri la lingvo. Eblas traludi tutan gramatikon en apliko al leksiko. Eble en la rolo de ludilo, lingvolerna ekzercilo, Esperanto enradikiĝos antaŭ ĉio en la elementa lernejo? Tiam ĝi ne plu restos nur ĝismorta hobio de kelkaj ĝisostuloj.

Por donaci nian karan lingvon al infanoj necesas daŭre kaj zorge poluri ĝin. Tion komencis la unua hobiulo - Zamenhof mem - ekde *La Dua Libro* kun proverboj kaj fabeltraduko ĝis plena fabelaro de Andersen. Kaj fine de la jarcento kaj de la jarmilo ni, hobiuloj, zorgu ne tiom pri niaj veteranaj bezonoj, kiom pri taŭgeco de Esperanto al infanoj.

Valdas Banaitis
Pergalis 26-35, LT-2041 Vilnius, Litovio

Ulrich Matthias

Instruistaj seminarioj ĉe popolaj altlernejoj

Valoraj instigoj

Ofertante Esperanto-kursojn ĉe popolaj altlernejoj, mi jam ofte ricevis invitojn al instruistaj seminarioj. Tamen, kiel multe okupita homo, mi kutimis neglekti ilin. Sed kiam la ĉefino de la popola altlernejo en Hanau pretis akcepti Esperanto-kurson nur sub la kondiĉo, ke mi partoprenos en enkonduka seminario por lingvoinstruistoj, mi fine cedis kaj aliĝis. La seminario okazis dum du semajnfinoj en Gelnhausen, kaj la popola altlernejo transprenis ĉiujn kostojn inkluzive de tranoktoj kaj manĝoj escepte de dufoje 50 DEM. Kaj efektive mi ne pentis mian partoprenon.

Konversacia ludo: Cocktail party

En la seminarioj unu el la du gvidantoj, Rainer Helling-Thiele, instruis al ni la svedan lingvon en moderna, modela maniero. Oni komencis per tio, ke ĉiuj ekstaris kaj ĉirkaŭiris, salutante unu la alian en la cellingvo. ("Saluton! Mi estas Rainer. Ĝis!") Tiu ĉi simplega ludo, kiu en la germana (?) nomiĝas *Cocktail party*, ripetiĝis de tempo al tempo, post kiam oni lernis ion novan. Helpe de kartoj, sur kiuj estis gluitaj eltranĉaĵoj el prospektoj de supermerkatoj, ni parolis pri ŝatataj

manĝoj kaj trinkaĵoj ("Ĉu vi ŝatas karotojn?"), kaj helpe de malplenaj kartoj Rainer instruis al ni la nombrojn ("Ĉu vi povas desegni 'unu'? ... Kiu volas havi 'unu'? ... Mi havas 'unu'. Kion vi havas? ... Ĉu ni ŝanĝu la ĉartojn?" ktp.) Post trifoje 30 minutoj, en la *Cocktail party* jam abundis la babilado: "Saluton! Mi estas Uli. Kiu vi estas? El kiu lando vi venas? Kie vi loĝas? Kie vi naskiĝis? Kie vi laboras? Kiujn lingvojn vi parolas? Ĉu vi ŝatas katnutrajon?" ktp. La lernantoj (t.e. ni) unuanime konsentis, ke tiamaniere ni vere ŝatus lerni la svedan.

Bazaj reguloj

Kvankam ni ne multe teoriumis, ni tamen notis diversajn "bazajn regulojn" por la lingvoinstruado, ekzemple la jenajn:

La kursanoj sidu en cirklo; ili ne havu fiksan sidlokon, sed ankaŭ moviĝu; la instruado okazu laŭeble nur en la cellingvo, la kursanoj kiel eble plej multe parolu, la instruisto nur malmulte korektu. Rainer eĉ korektis la kursanojn ĉiam nur de malantaŭe, metante sian manon sur ilian ŝultron (kio por mi montriĝis malfacile praktikebla).

Esperanto-kurseto

Fine de la unua semajnfino niaj gegvidantoj proponis, ke nun kelkaj seminarianoj gvidu kurseton de sia lingvo. Tuj mi deklaris min preta instrueti Esperanton, dum alia viro decidis oferti kurseton de la hispana. Je mia surprizo pli ol duono de la 20 aliaj seminarianoj (aŭ, pli precize, seminarianinoj, ĉar krom ni du ĉiuj estis virinoj) volis elekti Esperanton; nur danke al la peto de Rainer ("Ne iru ĉiuj al la Esperanto-kurso!") ni fine sukcesis formi du preskaŭ same grandajn grupojn. Kvankam montriĝis ege malfacile imiti la bonegan instruadon de Rainer (kiu ofte intervenis en la Esperanto-instruado por atentigi min pri eraroj), la lernantoj ege ĝuis la kurson. Mi lernis ĉefe, ke en unulingva kurso por komencantoj oni ne klarigu per vortoj, sed aktoru, ĉar nur tiam oni estas komprenata.

Plia seminario en Frankfurto

Surbaze de la pozitivaj spertoj el Gelnhausen, mi aliĝis ankaŭ al la unua semajnfino de la instruista kurso de la popola altlernejo en Frankfurto. Tie la partoprenantaro estis simila al tiu en Gelnhausen (temis ĉefe pri instruistinoj de latinidaj lingvoj, ĉar instruistojn de la angla oni ne invitis), sed anstataŭ la svedan oni instruis tie la finnan. Kaj ĉio estis malpli perfekta, sur malpli alta nivelo.

Komparo de lernolibroj

En Frankfurto ni jam dum tiu unua semajfino unue en grupetoj kaj poste en la

granda rondo komparis diversajn lernolibrojn. Kiel Esperanto-lernilon la popola altlernejo posedis nur (aŭ eĉ?) "Tesi, la testudo". Kvankam mi iom hontis pro ĝia mizera aspekto kompare kun la plej modernaj lernolibroj de la franca aŭ itala, mi klopodis dum la prezentado elstarigi kelkajn pozitivajn flankojn de ĝi.

En la dua semajnfino en Gelnhausen la aliaj kursanoj jam bonvenigis min per "Saluton!". Ankaŭ tie mi havis la okazon prezenti lernolibrojn de Esperanto, sed tien mi mem kunportis ilin. Tre pozitivan resonon trovis tie la kolora bildvortaro "Mil unuaj vortoj en Esperanto". Ĝi estas ne nur same bela kaj bonkvalita kiel ĝiaj nacilingvaj ekvivalentoj, sed ankaŭ ege bone taŭgas por instruado laŭ modernaj, konversaciaj metodoj.

Diskonigi Esperanton

Resume, mi travivis entute tri belegajn semajnfinojn, el kiuj mi povis ĉerpi multajn valorajn instigojn por mia Esperanto-instruado. Kaj plie, en la seminarioj mi bonege povis diskonigi Esperanton. En Gelnhausen unu partoprenantino tuj aĉetis de mi ĉiujn kvar lernolibrojn, kiujn mi kunportis; alia sendis al mi poste retleteron kun multaj Esperantaj frazoj, kaj tria rakontis, ke inter la du semajnfinoj ŝi jam interesigis amikinon pri nia lingvo. Certe mi ankaŭ estonte ankoraŭ partoprenos en tiaj seminarioj, kiujn preskaŭ ĉiu popola altlernejo ofertas al siaj instruistoj - kaj, se restas liberaj lokoj, kontraŭ kompleta repago de la kostoj eĉ al ĉiu ajn interesato. *(el Esperanto aktuell 8/98)*

Ulrich Matthias
Ohmstr. 13, DE-65199 Wiesbaden, Tel. 0611-46 67 12,
rete: Ulrich.Matthias@t-online.de

Por via notlibro

Serĉado de ekzerc-produktantoj

En la Pedagogia Eksperimentejo de Tria Roma Universitato ni estas konstruantaj Interretan Lingvan Laborejon (LIL), por trejni la lingvajn kapablojn de esperanto-instruistoj (kaj estonte uzebla ankaŭ por aliaj celoj, kiel projekto Interkulturo). Nun ni planas la strukturon de LIL, kiu antaŭvidas multajn ekzerco-tipojn pri la parola kaj la skriba lingvo, krom konsultejoj de lingvaj materialoj. Temas interalie pri: teksto-kompreno, priskribado, diktado, teksto-kompletigo, signif-elekto, sintaksa transformado, ktp.

Por ĉiu ekzerco-tipo ni mem pretigos kelkajn prototipojn por provi la sistemon. Poste, por starigi la instruan kaj komputan strukturon de LIL, ni bezonos taŭgan nombron da aliaj divers-nivelaj lingvaj ekzercoj por ĉiu tipo. Tio ja superas niajn modestajn homajn fortojn. Ĉu troviĝas kunlaboremuloj, kapablaj pretigi kromajn ekzercaĵojn laŭ donita modelo?


Rimarkindas ke la enhavo de LIL estas ĉiom esperantlingva; tial ne gravas la denaska lingvo de la ekzerc-aŭtoroj. Eĉ male: bonvenos alilandaj kontribuoj. Por tia kunlaboro, retaneco preferindas, sed ne nepras. Fidante la mondan solidarecon, amike:


Maŭro La Torre
<m.latorre@uniroma3.it>

Pri KVINPETALO

La ejo de nia sekva konferenco

Kvinpetalo estas la staĝejo, kulturcentro kaj studocentro de *Societo Yvonne Martinot* (SYM). Ĝi kuŝas en piktova regiono je 38 kilometroj de Poitiers. Eblas atingi ĝin ĉu trajne tra Poitiers [*puatie*] aŭ Lussac-les-Chateaux ĉu aŭte por malkovri la regionon. La centron estras *Georges Lagrange* kaj *Suzanne Bourot*.





Jen historieto pri la deveno de Kvinpetalo: Kiu estis *Yvonne Martinot*, la instiginto de Kvinpetalo? Ŝi estis virino kripligita kiam 2 jara, kiu havis fortan volon. Ŝi konatiĝis kun Suzanne Bourot okaze de Freynet-renkonto. Ŝi eklernis esperanton en 1971, sukcese trapasis ekzamenon «kapableco».. En 1984, dum kunveno pro preparo al "Altaj studoj' en la domo de Suzanne Bourot, kreiĝis Esperanto-centro sub instigo de Yvonne Martinot.

Ŝi forpasis la 4an de januaro 1985, sed jam la bazo estis firma. Per la kapitalo kiun Yvonne Martinot postlasis, Suzanne Bourot instaligis jam tranoktejon, klasĉambron kaj eĉ duŝejon en iama bovinejo, kuŝanta en la sama korto kiel ŝia domo. 6 tranoktadoj eblaj, tiutempe kaj 20 membroj proviziis 2 somerajn staĝojn. En 1985, tiu ĝermo fariĝis Societo, laŭ franca leĝo 1901 kaj komencis granda starto. En 1987, oficiala inaŭguro de Gaston Waringhien kaj la staĝejo daŭre kreskas, pli da staĝanoj, pli da staĝoj, kaj pli komfortigo de la staĝejo, nun nomita Kvinpetalo. Post aĉetado de aliaj dometoj en la korto, aranĝado, plikomfortigo la nuna situacio estas jena: 25 tranoktadoj eblas, 15 staĝoj disvolviĝas, kun 250 membroj inter kiuj pli ol 150 dumvivaj. Sume por 1998, 200 staĝanoj, 1100 tranoktadoj, kaj 3000 manĝo-preparoj. Ĝi estas vizitita de multaj alilandanoj, kaj ĝi riĉiĝis pere de heredo de bibliotekoj de Gaston Waringhien, kaj Roger Bernard.

La celoj de la societo estas (laŭstatute):

- instruado kaj praktiko de esperanto,
- preparado pro internaciaj kaj francaj ekzamenoj,
- organizado de staĝoj kaj lingvaj restadoj por la formado de esperantistaj kadroj,
- partopreno al promocio de Esperanto, eventuale kunlabore kun aliaj asocioj aŭ kulturaj organizoj.

Spegulante tiun statuton, staĝoj diversaj okazis, de ABC ĝis PIVo, de baza lernado ĝis preparo al ekzamenoj, de historio de la lingvo ĝis historio de Zamenhof, de literaturo ĝis konatiĝo kun eminentaj verkistoj, de redaktado de ĵurnalo ĝis hispana poezio, de flaŭristoj jogantaj ĝis ornitologoj piedmigrantaj, ĉiu povas elekti sian preferatan temon. Ĝi organizas perkorespondan kurson kvarnivelan. La unua nivelo taŭgas por komencantoj, la dua por progresantoj. La aliĝintoj ricevas lecionojn kaj taskojn, la taskon ili devas resendi por korektado.

Staĝoj daŭras 5 tagojn, vi povas peti programon pere de adreso: Kvinpetalo, Esperanto-centro, rue du lavoir, FR-86410 Bouresse, Francio aŭ pere de interreta adreso: <members.aol.com/yannick.dum/kvinpetalo.html>

Marie MALEZIEUX-HUNNINCK el Bouresse, Francio

Kompletigu vian kolekton de "La Praktiko"!

Ili estas plenaj je interesaj legaĵoj en modela stilo, taskoj por lingva ekzercado kaj kontrolo, ŝercoj, anekdotoj kaj enigmoj. Ili ilustras interesan kronikon de la tiutempa tutmonda Esperanto-Movado. Ili estas nepre legindaj! La prezo de binditaj jarkolektoj estas NLG 18,00. En stoko estas ankoraŭ ekzempleroj de la jaroj 1933, 1934 kaj 1950. Ni havas je dispono ankaŭ kelkajn nebinditajn jarkolektojn de la jaroj 1939, 1940, 1941, 1946, 1948, 1949, 1951, 1952, 1953, 1955, 1956, 1957, 1958, 1959, 1960, 1961, 1963 kaj ili kostas po NLG 15,00. Haveblaj estas ankaŭ lozaj numeroj de diversaj jaroj kaj ili kostas po NLG 2,00. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% pro sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas NLG 5,00.

Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel +31 70 355 66 77. Fakso + 31 70 358 44 22

Interesa SEK-statistiko

Unu el la plej laboremaj instruantoj en la anglalingva senkosta E-kurso (SEK) sendis al mi sian statistikon de la jaro 1998. Ĝi helpas al ni taksi la efektivan sukceson de la SEK-oj:

Leciono	Ĉesigis (%)	Faritaj(%)	Fortimigas(%)
0	64,5	100	
1	9	35,5	65
2	4,5	26,5	26
3	2,5	22	17
4	2	19,5	12
5	3	17,5	10
6	2,5	14,5	17
7	0	12	17
8	0	12	0
9	1	12	0
10	11	11	8


Legu la statistikon jene: La kolumno "ĉesigis" montras, ke 64,5% el tiuj, kiuj ricevis la kursmaterialon, ne sendis eĉ unu ekzercaron al la instruanto. Naŭ procentoj sendis precize unu ekzercaron. Unu procento sendis precize naŭ ekzercarojn. La kolumno "Faritaj" montras, ke 35,5% el tiuj, kiuj ricevis la kursmaterialon, sendis almenaŭ unu ekzercaron al la instruanto. La kolumno "Fortimigas" montras, ke ok procentojn el tiuj, kiuj sendis la ekzercojn de la naŭa leciono, fortimigas la fifama deka leciono.

Do, ŝajnas, ke triono el tiuj, kiuj petas la kurson, efektive komencas ĝin. Kaj triono el tiuj, kiuj efektive komencas la kurson, finas ĝin. (Aktuale la kurson petas po 70 homoj ĉiusemajne.) Kompreneble, ĉi tiu statistiko montras la nombrojn de nur unu instruanto, sed oni rimarku, ke la nombro 35,5% tute ne dependas de la instruanto, ĉar la instruanto ne kontaktas la kursanon antaŭ la unua ekzercaro.

La sama instruanto raportas, ke la finintoj bezonis de 1 ĝis 259 tagojn (meze 68) por fini la kurson.

Marko Rauhamaa
<marko.rauhamaa@iki.fi>

Recenzoj



Urso-kurso - ampleksa lern-kolekto

Nia brita sekcio, ETA, faris solidan kontribuon al la instruado de Esperanto al junaj angla-lingvanoj per aperigo de ĝia Urso-Kurso. Tio konsistas el laŭdinda gamo da lerniloj kuntenata en praktika plasta dosierujo. Ene troviĝas ses grand-formataj lerno-kajeroj, instruista gvidilo, son-kasedo, glob-krajono, puzlo kaj urso-familia lud-kartaro. Tiu lasta estis prezentita en Juna amiko 98/1, p. 12-13. La lerno-kajero inkluzivas koloran preson, kun tondeblaj kartonaj kartoj, kolorigendaj bildoj, memor-fiksigiloj kaj ekzercetoj, kiuj postulas fizikan plenumon.

La leksika kaj gramatika ŝarĝo estas malmulta kaj prezentita per grandliteraj, simplaj ekzemploj. Instrukcioj aperas angle, kiel ankaŭ la komenco de seria rakonto pri la vivo de Zamenhof. Aperas presite la tekstoj de la sonbendaj dialogoj, kun anglaj tradukoj. La instruista gvidilo prezentas (angle) ne nur teoriajn konsilojn, sed pli da labor-folioj kun kruc-enigmoj, paper-faldaĵoj, aktivec-kartoj, konstrueblaj ludiloj ktp.

Temoj de la unua kajero estas la koloroj, bestoj, la numeroj kaj familiaj rilatoj. La kurso estas destinita por infanoj sub gvido de gepatro aŭ instruisto, sed funkcias ankaŭ kiel koresponda kurso; eblas sendi la faritajn ekzercojn por kontrolado, post kiu oni ricevas la sekvan lern-kajeron. En la sekva numero de IPR aperos detala recenzo pri la kompleto kaj specife pri enhavo de la unua kajero.

Stefan MacGill

Esperanto-kvarteto – *Por paroligi komencantojn*

Antaŭ kelkaj monatoj aperis nova kartludo por paroligi komencantojn. Ĝi nomiĝas "Esperanto-kvarteto" kaj konsistas el 28 koloraj kartoj. Sur ĉiu karto troviĝas desegnaĵo (ekzemple de seĝo) kun la esperanta nomo de la koncerna objekto. Krome oni trovas en la supra dekstra angulo de ĉiu karto la nomojn de tri aliaj objektoj (ekzemple "pordo", "tablo" kaj "fenestro"), kiuj formas kune kun tiu karto kvaropon ("kvarteton"). Oni disdonas ĉiujn kartojn. La ludantoj (laŭnombre prefere inter 3 kaj 7) faras inter si demandojn laŭ la skemo "Ĉu vi havas tablon?" por akiri kiel eble plej multajn kvartetojn.

Laŭ miaj spertoj el Esperanto-kursoj ĉe germanaj popolaltlernejoj kaj dum la Internacia Junulara Festivalo en Rimini la ludo elstare bone sukcesas kaj ofte vere amuzas la kursanojn. Ĝi estas pli simpla kaj multe pli bela ol ĝia antaŭulo "Ludi kaj lerni" de Malte Markheden. La "Esperanto-kvarteto" eĉ taŭgas por rektmetoda kurso por komencantoj sen ajnaj antaŭscioj. Ankaŭ por pli spertaj lernantoj, por kiuj la frazmodelo "Ĉu vi havas ...?" jam ne estas io nova, la ludo havas sencon, ĉar ili lernas per ĝi la nomojn de diversaj objektoj kaj ekzercas la akuzativon. Por ili eblas krome uzi la malnovan ludon de Malte Markheden, eldonitan jam antaŭ ĉirkaŭ 15 jaroj, ĉar surbaze de ĝi eblas ankoraŭ pli multe interparoli.

Ĉiukaze mi rekomendas transpreni unu ludregulon de la "antaŭulo", nome ke kiam iu ne havas la petitan karton, daŭrigas la demandito (kaj ne la najbaro), kio foje pliigas la amuziĝon.

Mendante la ludon, oni estu avertita, ke oni ne ricevas ĝin en preta formo, sed kiel paperajn foliojn, kiujn oni devas eltranĉi kaj glui sur (aldonitan) kartonon. Por tio kaj la rekomendinda surgluado de travidebla plasta folio oni bezonas depende de la lerteco kaj perfektemo inter 90 minutoj (kiel skribas la aŭtorino Beatrice Huber) kaj kvar horoj (kiel bezonis mi). Sed la peno ege indas, ĉar tiamaniere oni povas doni al la lernantoj tre bonan ŝancon por - eventuale eĉ unuafoje - sperti Esperanton kiel funkciantan lingvon.

La ludo haveblas por DEM 10,- + DEM 3,- por la sendokostoj ĉe Munkena E-Junularo, Postfach 20 07 12, DE-80007 München, 💻: anaso1@aol.com.

Ulrich Matthias

El la landoj kaj sekcioj

Albanio

Terminaro pri matematiko

Lastatempe s-ro *Bardhyl Mezini* kompilis dudirektan, malgrandan fak-vortaron pri matematiko, surbaze de ekzistanta terminaro bulgara-rusa-esperanta de s-ino *Daniela Deneva*, eldonita en Sofio 1985. La venontan lernojaron s-ro Mezini intencas starigi E-kurson en Fakultato de Naturaj Sciencoj. Tiel krom ekzistantaj bonaj poralbanaj E-lernolibroj ties studentoj ekposedos ankaŭ fakvortaron sian.

Ĉu vi provos verki similajn aliajn fakvortarojn laŭ via studkampo? Ne hezitu!

laŭ Zamir Gjurgji, el la Bulteno de Albana ILEI-Sekcio, junio 1999

Bosnio kaj Hercegovino (Serba Respubliko)

La 3-a Somera Esperanto-Lernejo Teslić

La tria sesio de Somera Esperanto-Lernejo, en julio 1999, signifas ĝian pluan progreson, kun 25 diplomoj kompare kun 10 pasintjaraj kaj 12 partoprenantoj en 1996. Sep partoprenantoj pasis A-ekzamenon, 14 finis A-progresigan kurson kaj 4 ricevis B-diplomon. La kursojn gvidis *Miodrag Kocić* kaj *Radojica Petrović* el E-Instituto Beograd kaj *Vukašin Ćutić* el Banja Luka. Dutagan porinstruistan seminarion gvidis Radojica Petrović kaj partoprenis 5 instruistoj kaj kvar novuloj, kiuj ankaŭ faris provlecionojn en la A-progresiga kurso. [...]

La lernejo daŭriĝis kaj finiĝis per dutaga 4-a esperantista renkontiĝo de Serba Respubliko kun ĉeftemo "Praktika uzado de Esperanto en la mondo".

Aparte ĝojiga estis partopreno de 16-membra grupo de mezlernejanoj el Pale ĉe Sarajevo, kiun gvidis la instruistino *Nada Ćvoro*. Ilia apero signifas revivigon de tiu Esperanto-centro, iam konata pro la somera Esperanto-lernejo en Stambulĉiĉ ĉe Pale. Post rondotabla diskuto pri Esperanto-instruado kaj pri la projekto Interkulturo, s-ino Ćvoro decidis proponi al la direktoro de la mezlernejo en Pale aliĝon al Interkulturo.

Radojica Petrović
<radp@emi.yu>

Ĉinio

E-kurso en Tianjin

En la lastaj jaroj aktivas ĉinaj membroj de ILEI en la havenurbo Tianjin. Ili gvidas diversajn elementajn, progresigajn, superajn kaj konversaciajn kursojn. Inter la lernantoj aperas novaj esperantistoj. Ĉi-jare funkcias tri E-kursoj.

S-ro *Han Zuwu*, delegito pri instruado de UEA, membro de ILEI, gvidas kurson por ekzerci membrojn de Tianjin-a E-Asocio kaj delegitojn ĉeestantajn la 2-an Azian Kongreson en Hanojo, Vjetnamio ĉi-aŭguste. 20 diversaĝaj (de 13 ĝis 72) gelernantoj studas kaj praktikas ĉiudimanĉe. En la kurso s-ro Han uzas videobendon "*Mazi en Gondolando*", kiun donacis al li s-ino Mila v.d. Horst Kolińska de Nederlando dum renkontiĝo en Lodzo, Pollando.

S-ro *Paul Desailly* de Aŭstralio laboras nun en Tianjin-a Komerca Universitato kaj gvidas kursojn inter instruistoj kaj studentoj. Pli ol 30 junuloj lernas E-on diligente. Paul kaj liaj studentoj ofte vizitas la Esperanto-salonon de Tianjin-a E-Asocio.

S-ino *Liu Jun* gvidas kurson en Guohuangzi-mezlernejo de Tianjin. Ŝi instruas

Esperanton al dudekkvin 13-15-jaraĝaj lernantoj. Unu el iliaj lernomaterialoj estas Juna Amiko. La junajn lernantojn ofte vizitas alilandaj esperantistoj, inter ili estas Natalie Schuĉhert kaj Paul Desailly. Ili ankaŭ korespondas kun amikoj de diversaj landoj.

Han Zuwu, ĉina sekcio de ILEI
Wan Xin Cun 5 Qu, 21 Lou 1 Men 501, CN-300 162 Tianjin, Ĉinio.
Telefono kaj fakso: 86-22-8476 5557 (H)

Finnlando

Someraj kursoj

En julio hungara *d-rino Smidéliusz Katalin* invitite gvidis 2 kursojn en Finnlando. Unue okazis trejniga 12-hora "Edusem" por instruistoj kaj poste 20-hora progresiga kurso kun la temo "Finnlanda kulturo" por studantoj.

Samtempe okazis komencanta kurso gvidata de la sekci-estro surbaze de la jus-aperinta finna traduko de la lernolibro "Egaleco kaj paco per Esperanto" de Lars Forsman. Ĉiuj kursoj havis vesperajn programerojn, kie oni lernis kaj amuzis sin per Esperanto: la kursanoj i.a. vizitis parkon, ekologian ekspozicion "Mola teknologio", lernis fari florojn el papero, aŭskultis raporton pri la nuna vivo en Hungario. La kursanoj ankaŭ ekspoziciis siajn plej novajn kaj interesajn E-librojn. La kursanoj ricevis atestilon pri sia partopreno. Estus bone, se ILEI havus internacie uzeblan modelon por tia atestilo, kie estu menciataj ankaŭ la nombro de la instruhoroj, la nivelo kaj enhavo de la kurso.

D-rino Smidéliusz tre lerte gvidis la kursojn en vigla rekta metodo. Ŝi multe uzis aktualajn bildojn kaj artikolojn el la gazetaro, tradukigis aŭ resumigis tagajn novajojn, konversaciigis.

Forpasis dumviva membro

S-ro Hemmo Tietti, origine germano Helmuth Dibelius naskiĝinta en 1911, dumviva membro de ELFI/ILEI, forpasis la 20an de majo 1999. Siatempe li multege agadis en la finnlanda kaj internacia E-movado, korespondante, telefonante, prelegante, instruante. Unu el liaj fakoj estis stenografio, alia unitarismo. En la lasta jaro li ne plu havis forton mem skribi sed diktis la leterojn. Lia nomo restos en memoro pro la Tietti-instituto en Togolando, kiel mencias Gbeglo Koffi en "Esperanto" (junio 1999).Tombon aŭ nomŝildon li nenie volis havi, sed pro sia firma vivofido li ankoraŭ en decembro 1998 diris: "Sufiĉas ke ni pensu unu pri la alia silente... Mi ekzistos plu, iel kaj ie. Ion mi faros."

Raita Pyhälä, sekciestro

Finnlando-Pollando

Kunlaboro de pola kaj finna lernejoj

La 6-an kaj la 7-an de junio per la ret-radio Pola Radio aŭdigis intervjuon kun *Jorma Ahomäki* el Piispanristi (Finnlando) pri la kunlaboro inter Kultur-centro de Milanowek kaj lernejo de Piispanristi en la suda Finnlando. Temas pri interŝanĝo de infandesegnaĵoj. La interŝanĝo efektiviĝis per Esperanto.

La finna ekspozicio funkciis en Milanowek dum la tuta majo, aliflanke la ekspozicio de la desegnaĵoj de polaj infanoj same en majo estis prezentita en la lernejo de Piispanristi. Poste oni montros ĝin en Hyvinkää – suda Finnlando.

En Milanowek ĉi-monate, nome la 20-an de junio oni malfermos grandan ekspozicion de infandesegnaĵoj el 19 landoj. Temas pri ĉ. 400 desegnaĵoj, pentraĵoj kaj aliaj artaĵoj je la komuna titolo "Mia malgranda patrujo". Ĝi ankaŭ realiĝis per Esperanto.

A. Pettyn, <pettyn@radio.com.pl> (el Ret-Info)

Francio

Korespondpeto I.

"Kiam mi gluas la markojn, mi amare pripensas... Imagu, ke por la Esperanta infanklubo, kiun mi estras, de 10 jaroj mi ne sukcesis trovi korespondantojn eĉ en unu el la 15 landoj de Eŭropa Komunumo. Mi tre facile trovas alie en la mondo. Ni havis en 1999 fruktajn interŝanĝojn kun 15 landoj, sed neniun ĉe niaj proksimaj najbaroj. Mi vane serĉis en Germanio, Italio, Hispanio, Britio... Mi mendis ĉe Mondskala Servo, en la gazetoj mi gvatas. Nur unufoje estis anonceto de infangrupo en Italio, al kiu ni rapide faris allogan prezentadon de nia klubo kaj regiono, sed sen respondo... .Tamen, se ni deziras Esperanton, kiel komuna lingvo, ni nepre devas komenci kun la infanoj!

Do, mi alvokas pere de IPR, favore al 12 gelernantoj inter 11 kaj 14 jaroj. Nia adreso: *Esperanto-klubo, Collège Yolande d' Anjou, FR-49490 Noyant, Francio*

Madame Paulette Naulet

Korespondpeto II.

Mi estas franca instruistino en antaŭelementa lernejo (infan-lernejo) nomata "Les 4 vents -Martin Luther King" en la urbo Chateauroux (centra parto de Francio). De kelkaj jaroj ni korespondas kun diversaj klasoj en la mondo, sed pro projekto SOCRATES ni nepre bezonas plurajn korespondantajn klasojn eŭrope. Ne gravas se la infanoj de la korespondantaj klasoj estas pli aĝaj ol la niaj. Skribu al

Maryvonne Houviez rete: Maryvonne.houviez@wanadoo.fr

Germanio

PSI – Denove Mazi

Mazi en la filmo - Mazi-pupoj – Mazi-kantoj – Mazi en scenoj – Mazi-aĵoj – ĉio ĉi dum la 15-a PSI (Printempa Semajno Internacia) okazinta inter la 3-a kaj 10-a de aprilo 1999 en Germanio. En la rekorda nombro de partoprenantoj (159) konsiderinda kvanto estis infanoj.

Mazi-n elektis po 2-foje tage la pli etaj el ili, ĝis proksimume 10-jarulo.

Kompreneble la nivelo de la lingvoposedo de infanoj ege diversis.

Malgraŭ tio la Mazi-fabelo tenis la atenton de la etuloj kaj inspiris ilin al agrabla kunludado.

[*la apuda foto fariĝis dum la ĉi-jara PSI*]

Katarína Bodnárová
Hlavná 63, SK-07631
Streda nad Bodrogom,
Slovakio



NdlR – La sekva, 16-a PSI okazos en St. Andreasberg (montaro Harz, Germanio) inter la 17-a kaj 24-a aprilo 2000. Aliĝoj, informoj: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, rete: psi@esperanto.de, http://www.esperanto.de/psi

Instruista Seminario

De la 5-a ĝis 7-a de novembro 1999 okazos en Wiesbaden seminario pri "Komunika Esperanto-Instruado". Ĝin gvidos - ĉefe surbaze de spertoj el instruistaj seminarioj de popolaj altlernejoj – *d-ro Ulrich Matthias, Ohmstr. 13, DE-65199 Wiesbaden, rete: <Ulrich.Matthias@t-online.de>*

Hispanio

Nova porkomputila kurso

Post sufiĉe peza kaj longa laboro jus aperis surdiskede Elementa Kurso de Esperanto en la kataluna por enkomputila uzado. La kurso, kiu enhavas entute 14 lecionojn kaj 7 kromajn simpligitajn tekstojn pri la kulturo kaj movado esperantistaj, estas rezulto de la kunlaboro inter Kataluna Esperanto-Asocio, el kies perkoresponda kurso ĝi estas adaptado, kaj katalunaj membroj de ILEI.
La grafika aspekto de la kurso estas ja teknike tre modesta, sed post daŭra plibonigado oni jam planas eldoni ĝin CD-ROM-forme kun aldono de son-bendo. Krom tio estas ankaŭ planata la apero de iom pli baza versio de la kurso en oficiala prieduka interreta paĝaro.

Pedro M. Martín

Kurso pri Esperanto en la Universitato de Valencia

Dum la nuna lernojaro, 1998/1999, okazis denove, jam por la kvara jaro, kurso de Esperanto en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Valencia (Hispanio). Kiel dum la antaŭaj tri jaroj la problemo estis, ke deziris aliĝi pli da gelernantoj ol da sidlokoj estas en la lingva laboratorio, kie okazas la kurso.

Ĉi-jare, por ebligi aligi pli da homoj, oni disdividis ilin en du grupojn. Entute partoprenis kaj ricevis diplomon de la Universitato 93 gestudentoj.

La diplomo de la kurso de Esperanto havas oficialan akademian valoron je tri kreditoj de "Libera Elekto", kaj ĝi estas parto de la universitata kariero, ene de la stud-plano, tutsame kaj kun la sama valoro kiel iu ajn alia studobjekto. Aliĝis ne nur gestudentoj de la Fakultato pri Filologio, sed ankaŭ de aliaj fakultatoj, kondiĉe ke ili apartenu al la sama valencia universitato. La profesoro de la kurso estis *Augusto Casquero*, kaj la direktoro *D-rino Berta Raposo*.

Por la oficiala fermo prelegis kiel honoraj gastoj s-ro *Gian Carlo Fighiera* (Italio), pri la temo "Praktika uzo de Esperanto", en Esperanto kaj hispana lingvoj, kaj s-ro *Jorge Camacho* (Hispanio-Belgio), akademiano de Esperanto, pri la temo "Verki en du lingvoj samtempe: hispana kaj Esperanto", ambaŭ kun grandega sukceso inter la ĉeestantoj, kiuj vere ĝuis tiujn belajn kaj interesajn prelegojn, tre alloge prezentitaj. Tuj poste ĉiuj ricevis diversan Esperantan materialon, kaj oni enmanigis al ili la atingitajn diplomojn.

Augusto Casquero

Hungario

155 kursfinintoj + someraj kursoj en orienta Hungario

La 4-an de junio 1999 oni aranĝis ŝtatajn lingvo-ekzamenojn pri Esperanto en TIT (Scienc-populariga Societo) en la urbo Nyíregyháza, Hungario. Al la ekzameno aliĝis 70 personoj. La 3-an kaj 7-an de junio 1999 entute 85 gestudentoj de KLTE (Scienca Universitato "Lajos KOSSUTH") en la urbo Debrecen, Hungario trapasis sukcese la t.n. studfinan ekzamenon pri Esperanto (post 40-hora kurso).

* * *

En la unua semajno de julio komenciĝis pluraj E-kursoj en Orient-Hungario, la baznivelaj kursoj estas 60-horaj, la meznivelaj estas 120-horaj, ĉiuj gekursanoj (korespondaj altlernejanoj) strebas sin pretigi por sukcese trapasi en oktobro ŝtatan lingvoekzamenon pri Esperanto, ja ili bezonas ĝin por sia faka diplomo en altlernejo. La kursoj estas en TIT en la urbo Nyíregyháza [Ny.], 29 gestudentoj en kurso gvidata de Tibor PAPP; studenthejmo de DOTE (Medicina Universitato de Debreceno), Nyíregyháza, 24, PAPP; Altlernejo GATE (Agrarscienca Universitato de Gödöllő), Nyíregyháza, 16, PAPP; Altlernejo GATE, Nyíregyháza,14, d-ro Attila SALGA; Altlernejo de DOTE, Debreceno, 10, Pál GAJDOS.
La organizanto de la unua estas TIT, tiu de la aliaj "Studio LONDON". Do, jen novaj ĉirkaŭ cent Esperanto-gekursanoj !

laŭ informoj de Tibor PAPP, db@satrax.hu

Irano

E-kurso en irana ĵurnalo



Fine de la pasinta jaro komenciĝis E-kurso en la monata gazeto "Pesáran Va Doĥtáran" [= gefraŭloj]. La kurson aranĝis juna jurnalisto *Akbar Fekri*, kiu mem eklernis Esperanton antaŭ du jaroj de s-ino Ĵila Sedighi en la kulturejo "Sana Urbo". (Tio estas projekto de la Monda organizo pri Sano de UN.)

[*Sur la foto de Naser Asgar-Zadegan vi vidas ekzemplerojn de la menciita ĵurnalo.*]

laŭ informoj de Mojtaba Kheir-Khah

Italio

Deviga Esperanto instruado

En Cupramarittima (provinco Ascoli Piceno) la estro de la Mezlernejo "Dante Alighieri" akceptis la proponon de *Raffaela Cantalino* (profesorino pri literaturo de tiu lernejo) instrui Esperanton en la klaso II/B al 18 gelernantoj 12-jaraj. Cantalino estas unu el tiuj dekdu lernantoj, kiuj sukcese finis la duagradan kurson de *Lina Gabrielli* en marto 1998.

En Cupramarittima ne temas pri kurso, sed pri deviga instruo sur la sama nivelo de la angla lingvo. La instruisto de la angla lingvo kunlaboras. La junuletoj estas tre entuziasmaj kaj la instruisto de la angla ne estas ĵaluza, se ili preferas la pli facilan Esperanton, eĉ pli facilan ol la itala lingvo. Ili avidas la Esperanto-insignojn por meti ilin sur la brusto. Bonvolu sendi leterojn kun belaj poŝtmarkoj al ilia adreso: *Klaso II/B de la Scuola Media "Dante Alighieri" di Cupramarittima, Ascoli Piceno.*

Laŭ informoj de Lina Gabrielli

Influo de Esperanto sur metalingvaj kapabloj

En junio 1999 studentino de la Unua Roma Universitato "La Sapienza" doktoriĝis pri psikologio, pridiskutante la "tezon", ke la kono de la Internacia Lingvo povas pliigi la "metalingvajn" (=lingvopripensajn) kapablojn de la infanoj, eĉ pri sia denaska lingvo. Tiucele ŝi prilaboris la rezultojn de instru-eksperimento ESP², aranĝita de la Tria Universitato en specimeno da italaj bazlernejoj. Laŭ la disertaĵo de tiu studentino el Napolo - kaj laŭ ŝia referanto, prof-ino Pinto - la statistikaj datumoj konfirmas tiun tezon: la klasoj, kie oni lernis Esperanton dum unu jaro kaj duono, montris rimarkinde pli bonajn rezultojn en la testoj pri metalingva kapablaro, kompare kun ceteraj klasoj. La eksperimento jam ekvekas intereson ĉe psikolingvikaj kaj instru-sciencaj medioj.

Maŭro La Torre,
Pedagogiscienca Laborejo, Tria Roma Universitato
<m.latorre@uniroma3.it>

Jugoslavio

Eksperimenta kurso en Zajeĉar

Esperanto-societo en Zajeĉar, orienta Serbio, organizis en la lernojaro 1998/99 publikan kurson en la societejo, kun 9 partoprenantoj en la komenca A kaj daŭriga B gradoj, kaj eksperimentan kurson por lernantoj de la 4-a klaso de elementa lernejo (11 jaroj) kun 15 partoprenantoj. La publika kurso okazas ĉiujare, kun malmultaj kursanoj, sed el kiuj plejmulto fariĝas kaj restas seriozaj membroj de la societo.

Unu el tiaj pasintjare estis *Jadranka Miriĉ*, diplomita filologo, instruistino de la angla lingvo.

Ĉi-jare s-ino Miriĉ gvidis la eksperimentan kurson en la Elementa lernejo "Ljuba Nešic'", surbaze de la programo kiun aprobis la Konsilio por edukado de Serbio en la jaro 1982. Ŝi uzis la lernolibron "Esperanto por ni" de Jozefo kaj Helena Mikulás, Budapeŝto 1989, kaj aplikis la aŭd-vidan metodon. En la unuaj semajnoj la lernado estis bazita sur nur buŝa lingvouzo kaj ludoj, kun memorado sen skribado. Pro malofteco de la instruhoroj (nur unu semajne) montriĝis ke la memorado sen surpaperaj notoj ne sufiĉas por havi kontinuecon de la lernado. Skribado estis enkondukita kaj la rezultoj pliboniĝis. La lernantoj ŝatis la konversaciajn ludojn, skeĉojn, recitadon, kantojn. Publikaj prezentaĵoj por gepatroj estis aranĝitaj, precipe en la jarfina solenaĵo. Sed la vera fino kun ekzamenoj por la kursoj estas prokrastita al aŭtuno, pro la bombado de Jugoslavio. Oni esperas je nova kurso. Grupo de pli aĝaj lernantoj (13 – 15 jaroj) de la sama lernejo partoprenos en la projekto Interkulturo.

Radojica Petroviĉ, radp@emi.yu

Kroatio

Nederlanda kaj kroata lernolibroj de Esperanto

En Zagreb aperis la oka kroatlingva eldono de la zagreba Lernolibro de la Internacia Lingvo. En Maribor (Slovenio) samtempe aperis la nederlanda eldono. La eldonistoj de la zagreba eldono estas Kroata Esperanto-Ligo kunlabore kun Izvori kaj de la nederlanda Inter-Kulturo Maribor. Kompare kun la antaŭaj eldonoj la oka estas riĉigita per ilustraĵoj de Teodora Kučinac. La kroata eldono aperis en mil ekzempleroj.

Por la nederlanda eldono, kiun aŭtoris grupo de zagrebaj aŭtoroj Zlatko Tišljar, Spomenka Štimec, Ivan Špoljarec kaj Roger Imbert, kunlaboris Roel Haveman, Marceline van Leewen-Burg, Marjet Erasmus-van Zadelhoff, Piet Uittenboogaart, Jan Hut kaj Rob Moerbeek.

Spomenka Štimec, <esperanto@zg.tel.hr>

Nepalo

Nepala E-Asocio organizas la trian Internacian Himalajan Renkontiĝon de la 26-a de februaro ĝis la 7-a de marto 2000. Aliĝoj kaj pliaj informoj ĉe: *s-ro Narendra Bhattarai*, vic-prezidanto de NespA, G.P.O. Post Box 10518, Kathmandu, Nepal aŭ *s-ro L. P. Agnihotri*, prezidanto de NespA, <Sosierra@wink.com.np>

Norvegio

Kursoj dise en la lando

En 1998 kvindek homoj konatiĝis kun Esperanto per la aŭtunaj kursoj organizitaj de NEL kaj pliaj 18 per kursoj gvidataj de lokaj fortoj (en Hamar, Stavanger, Tromsø kaj Oslo). Por la sesa sinsekva jaro okazis kursoj profesinivelaj de *Atilio Orellana Rojas* el Argentino, ĉi-foje por komencantoj en Oslo, Tønsberg, Trondheim, Tromsø kaj Sansvik. En Oslo kaj Tønsberg li gvidis ankaŭ po unu kurson por komencintoj en kiuj partoprenis 12 gelernantoj.

(Laŭ la Jarraporto de Norvega Esperantista Ligo)

Pollando

Polaj E-instruistoj renkontigis en Krakovo

Dum la tagoj 24 - 25 de aprilo 1999 okazis en Krakovo Esperantologia - Didaktika Konferenco de la Pola Sekcio de ILEI. La Konferencon partoprenis pli ol 30 personoj. Ĉeestis ĝin polaj instruistoj kaj gestudentoj de la Scienca Studenta E-Rondo en Krakova Jagielona Universitato. La partoprenantoj solene honoris la 140-an naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto - L. L. Zamenhof kaj 50-jarigo de ILEI. La inaŭguron de Konferenco faris s-ino *Maria Majerczak*. La abundan programon de la Seminario plenumis multaj interesaj prelegoj:

- *Dorota Szczygieł* (Krakovo) parolis pri efikeco de la lernado dum kiu estis tuŝitaj koncentriĝo kaj memorkapablo - kun praktikaj atentigoj kaj ekzercoj.
- *Maria Majerczak* - kadre de metodiko de instruado de Esperanto priparolis diversajn faktorojn favorantajn atingi bonajn sukcesojn en tiu ĉi kampo. Gvidita de si praktika leciono kun gestudentoj de Jagielona Universitato vekis grandan interesiĝon de partoprenintoj.
- *Eva Bondar* - tre interese prelegis je la temo: Kiamaniere instrui por sukcesi? Dum la prelego ŝi prezentis uzatajn metodojn kaj montris praktikajn ekzemplojn de sia instruado.
- *Jadwiga Gibczyńska* (Krakovo) - dividis siajn spertojn kun partoprenantoj pri utiligo de aktorado en la lingvoinstruado. Interesa prezento de la temo vekis grandan intereson de aŭskultantoj.
- *Lidia Ligęża* (Krakovo) - paroladis pri problemoj de esperantigado de la nuntempa pola poezio. Multaj ekzemploj bone spegulis la ekzistantajn traduk-problemojn.
- *Bożena Pietrzyk* (Siedlisko) - interese babilis pri siaj spertoj koncernantaj praktikaj problemoj de E-instruado.

Dum la renkontiĝo elpaŝis la koruso de E-Rondo "Sub la Verda Stelo" en Tychy, gvidata de s-ino *Danuta Tudaj* (Katowice). La aŭskultantaro honoris la aktorojn

per tondraj aplaŭdoj. La promenado tra la urbo kaj vizitado de historiaj lokoj de Krakovo donis al ni ĉiuj neforgeseblajn impresojn. Dankante al ĉiuj organizantoj ni atendos la venontjaran renkontiĝon.

Antoni Beyga, <antobe@friko.onet.pl>

Svedio-Ukrainio

Junulara projekto

Kadre de la sveda-ukraina junulara interŝanĝa projekto *Julja Hordijenko* kaj *Lovisa Gustafsson* 16-21 de majo laboris en Poltava, 22-28 de majo - en Ĥarkov. La knabinoj renkontiĝis plejparte kun studentaro, lokaj junularaj Esperantaj kluboj. En ambaŭ urboj oni organizis konferencojn por gazetaro kaj filmis la projektantinojn por televidaj novajoj.

Impresoj pri laboro: interesoj kaj opinioj de junularo en Svedio kaj Ukrainio pri Esperanto estas ne la samaj. En Svedio oni pli interesiĝis pri mem lingvo, ĝiaj gramatikaj principoj. En Ukrainio junularo pli interesiĝas pri novaj eblecoj, kiujn kunportas Esperanto. Ukrainiaj gejunuloj post prelegoj ofte esprimas ekinteresiĝon pri la lingvo, petas kie aŭ kiumaniere eblas lerni Esperanton.

En lasta dimanĉo de majo la projektantinoj helpis al klubo "Ora Pordego", kiu organizis sinprezenton dum festo "Tago de Kievo". Ĝis la 8-a de junio ili laboris en Kievo, inter 9-13 de junio en Luck.

Konstantin Demjanenko, Berdjansk, Ukrainio
aznauka@berdyansk.net
(laŭ SEJM-VIRT-INFO, n-ro 17)

Usono

Esperanto-klasoj por infanoj en Usono

En sia jarraporto al ELNA kiel Komisiito pri Edukado, *Kent Jones* raportis ke en la lerneja jaro 1998-99 35 instruistoj en 21 ŝtatoj en Usono instruis Esperanton al 1312 infanoj dum entute 13102 stud-horoj.

(El AAIE-Bulteno, junio 1999)

Uzbekistano

La unua E-studlibro por uzbeklingvanoj

Finfine, subtitole "ESPERANTO HALKARO TILI" ("Internacia Lingvo Esperanto") aperis la unua uzbeklingva E-studlibro. Pri ties apero raportis lokaj kaj tutlandaj amaskomunikiloj. Tiun ĉi, ĉirkaŭ 230-paĝan, longe atendatan en Uzbekistano libron aŭtoris samarkandaj esperantistoj *Anatoli Ionesov* (direktoro de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro) kaj *Bahodir Habibov* (profesia

lingvoinstruisto). La libro enhavas 12-lecionan E-gramatikon, Esperanto-Uzbekan kaj Uzbeka-Esperantan vortaretojn kaj Uzbeka-Esperantan konversacilibreton. Krom tio enestas kurta esperantlingva priskribo de la uzbeka lingvo, ties gramatiko kaj prononcreguloj, kio faras la libron interesa kaj praktike uzebla ankaŭ por alilandaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la uzbeka lingvo kaj al vojaĝontoj al Uzbekistano. La libro aperis ĉe moskva E-eldonejo "Impeto" danke al financa subteno de la Eduka Fondaĵo Carson. La eldono estas dediĉita al la Internacia Muzeo de paco kaj Solidaro, kies naskiĝo okazis en Samarkando antaŭ ĉio danke al la internacia lingvo Esperanto. La unua E-studlibro por uzbeklingvanoj haveblas ĉe Libroservo de UEA.

A. Ionesov (el Ret-Info)

Zimbabvo

11 klasoj el Zimbabvo aliĝas al Interkulturo

Oliver Mazodze, direktoro de la Zimbabva Esperanto-Instituto el Masvingo, komunikis la decidon de 24 zimbabvaj instruistoj partopreni la internacian edukan Projekton "Interkulturo" kun siaj 11 klasoj de mezgradaj kaj bazaj lernejoj el diversaj urboj. Jam pli frue 3 klasoj (300 lernejanoj) el Lomeo petis aliĝon je la sama aranĝo, gvidataj de sia instruisto *Gbeglo Koffi*.

laŭ informoj de Maŭro La Torre
<m.latorre@uniroma3.it>

El niaj metiejoj

Li Weilun

Rolo de ludoj en lingva instruado

Ĉu ludoj apartenas nur al la infanoj? La respondo estas nea. Psikologio montras, ke ludi estas instinkto de la homo. Ludoj estas necesaj ne nur por infanoj, sed ankaŭ por plenkreskuloj. Por garantii psikan sanon kaj plene disvolvi kreivon oni bezonas ludojn. Moderna pedagogio prenas ludadon kiel gravan rimedon transdoni sciojn, kulturi kapablojn kaj eduki homojn.

Instruaj ludoj estas diversaj:

1) *Fonetikaj ludoj*. Ekzemple: noti vokalojn el ĉiu vorto, noti nombron de silaboj de ĉiu vorto ktp.
2) *Vortaj ludoj*. Ekz.: formi vorton per donitaj literoj, sinsekve diri vortojn, diveni objektojn en la sako ktp.
3) *Gramatikaj ludoj*. Ekz.: ludi per ciferoj, formi frazojn per donitaj vortoj ktp.

4) *Aŭdaj ludoj*. Ekz.: serĉi bildojn aŭskultante vortojn, desegni bildon aŭskultante tekston ktp.
5) *Parolaj ludoj*. Ekz.: doni konsilojn, priskribi samklasanojn ktp.
6) *Legaj ludoj*. Ekz.: legi frazojn montritajn de instruisto en mallonga tempo, legi tekston skribitan sur la tabulo kaj forviŝitan iom post iom ktp.
7) *Skribaj ludoj*. Ekz.: kolektive verki artikolon (ĉiu lernanto skribu unu frazon sur la nigra tabulo) ktp.
8) *Tradukaj ludoj*. Ekz.: sinsekve traduki frazojn (unu lernanto naci-lingvigu, alia esperantigu...) ktp.
9) *Sciaj ludoj*. Ekz.: diri la nomon de kanto laŭ ĝia melodio, ligi landon kaj ĝian ĉefurbon (famulon kaj lian naciecon, verkiston kaj lian verkon, historian eventon kaj jaron...) ktp.
10) *Intelektaj ludoj*. Ekz.: diveni objekton aŭ personon per demandoj, diveni la finon de rakonto ktp.
11) *Rolaj ludoj*. Ekz.: ludi diversajn rolojn kaj interparoli ktp.

La rolo de ludoj montriĝas en jenaj flankoj:

1) Ludoj estas utilaj por forigi lacecon kaj vigligi la etoson de la klasĉambro. Psikologia studo pruvis, ke la atento de la homo estas la plej bona nur en la komencaj dudek minutoj. Poste ĝi fariĝas pli kaj pli malbona. En tiu momento ludado povas ne nur forigi lacecon, sed ankaŭ levi aktivecon de la lernantoj. Ili diras, ke lude lerni estas tre interese kaj la tempo pasas nerimarkite.
2) Ludoj povas venki psikologian obstaklon de la plenkreskuloj en la lernado de fremdlingvo. Unu el la plej grandaj psikologiaj obstakloj de la plenkreskuloj en lernado de fremdlingvo estas manko de fido kaj kuraĝo. Ili timas fari erarojn kaj 'perdi vizaĝon'. Pro tio ili ne kuraĝas paroli. Tamen dum ludado ili sentas sin senĝenaj kiel infanoj. En tiu psikologia stato ili lernas aktive, forgesante timon kaj honton.
3) Ludoj utilas al atingo de la plej bona instrua efiko. Eksperimento de psikolingvistiko pruvis, ke interesaj formoj kaj enhavoj povas altigi la memoron je faktoro de 1.5. Ludoj estas interesaj kaj postulas strečitan atenton kaj absorbitecon. Tial la materialoj, kiujn la lernantoj lernas dum ludado, bone restas en ilia memoro.
4) Ludoj estas diversformaj. Ĉiufoje la instruisto povas uzi kelkajn novajn ludojn. Tiel la lernantoj ĉiam atendas lecionon kun granda scivolemo kaj senĉese sentas freŝecon. Pro tio ili ĉiam ricevas sciojn kun granda intereso.
5) Ludoj povas ekspluati intelekton kaj lertecon de la lernantoj. Dum ludado la lernantoj devas uzi sian komprenpovon, juĝpovon, imagpovon, rezonpovon ktp. Pro tio ludoj ne nur helpas al la lernantoj posedi lingvajn sciojn, sed ankaŭ altigas iliajn diversajn kapablojn.

6) Ludoj estas utilaj por kulturi kolektivismon de la lernantoj. Ludado estas kolektiva aktivado. Dum ludado la rilatoj inter la lernantoj fariĝas pli intimaj. Multaj ludoj povas esti farataj per konkurso inter grupetoj. Ĉiu grupetano devas batali por la kolektiva honoro.

Aranĝante instruajn ludojn, oni devas konsideri la jenajn punktojn:

1) Ludoj devas kunordiĝi kun la instruo. Ekzemple, dum lernado de fonetiko oni povas fari fonetikajn ludojn. Post lernado de la numeraloj oni povas fari ciferajn ludojn ktp.
2) Ludoj devas konveni al la lingva nivelo de la lernantoj. Ludoj povas esti facilaj aŭ malfacilaj. Oni devas elekti ludojn laŭ la nivelo de la lernantoj.
3) Ludoj devas esti farataj de ĉiuj lernantoj. Tio estas, ĉiu lernanto devas partopreni en la ludado.
4) Ludoj devas esti farataj en oportuna tempo. Kiam la lernantoj komencas senti lacecon, ludoj povas vigligi ilin.

__La prepozicioj kun__ kaj __per__ kaŭzas problemojn ĉe multaj nacioj. Nun ni prezentas tekston, kiu taŭgas al ekzercado aŭ kontrolo - NdlR

La sorto mokas

Estis malvarma aŭtuna vespero. La vento . . forta blovo skuadis la arbojn en la parko. Petro ... malgaja koro sidis sur la benko kaj ... malsekaj okuloj rigardis al la ĉielo. Petro estis malfeliĉa. Li tiris ... siaj frostantaj manoj la ĉapelon sur la orelojn kaj ... timo li pensis pri tio, ke post kelkaj tagoj komenciĝas malbona vetero ... frosto kaj pluvo kaj ke li ne povos plu dormi dum la noktoj sur benkoj en la parko.

Petro, ... kiu ni konatiĝas en tiu ĉi rakonto, vidis iam pli bonajn tagojn, kiam li ankoraŭ vivis ... sia familio. Li estis eĉ riĉa. Sed ... kartludado ... siaj amikoj li perdis sian havaĵon kaj fariĝis vagabondo. La ĉiutagan panon li akiradis ... almozpetado kaj la noktojn li pasigadis sur benkoj en la parko ... samsortaj amikoj. Nun la malvarma vetero atentigis lin, ke li devas serĉi vintran loĝejon. Sed li ne havis monon ĉar ... sia lasta mono li aĉetis eluzitan ĉemizon ... du kolumoj. Fine li ekhavis ideon. Ekzistas bonega hotelo, en kiu oni povas loĝi ... ĉiu komforto kaj kie la gastoj pagas ne ... mono, sed ... malbonfaroj. Estas la malliberejo.

Petro, do, decidis klopodi ... ĉiuj fortoj, trovi eblecon por loĝi tie dum la tuta vintro. ... la manoj li glatigis sian eluzitan vestaĵon, en kiu li iam dancis ... belaj sinjorinoj, kaj ekiris ... fortaj paŝoj.

Dum la irado li parolis ... duonlaŭta voĉo ... si mem: Petro, nun vi iros ... kuraĝo

en bonan hotelon. Tie vi manĝos supon ... kolbaso, anason ... legomo kaj kukon ... kremo. Post tio vi trinkos vinon ... minerala akvo. Fine venos la kelnero ... la kalkulo. Tiam vi diros al li ... mallaŭta voĉo, ke vi ne havas eĉ unu moneron. La kelnero ... telefono vokos policiston kaj vi veturos ... li ... aŭtomobilo al la malliberejo.

Sed en la hotelo la unua kelnero, ... kiu li komencis paroli, ... siaj spertaj okuloj tuj ekkonis en li la vagabondon kaj ... forta puŝo eljetis lin el la manĝejo. Petro elflugis ... sia granda apetito sur la straton.

Li volis proponi monon al la policisto, kiu staris ... gumbastono ĉe stratangulo por ke li arestu lin. Sed li ja ne havis monon. Li faris kelkajn paŝojn ... siaj lacaj piedoj, kiam li ekvidis montrofenestron ... horloĝoj kaj valoraj ornamaĵoj. Venis al li nova. ideo. El la stratpavimo ... iom da klopodo li elprenis grandan ŝtonon kaj ... ambaŭ manoj kaj ... kolera vizaĝo ĵetis ĝin en la fenestron. La granda fenestro ... forta bruo disfalis. Baldaŭ alkuris granda homamaso. Alvenis tuj ... aŭtomobilo ankaŭ policistoj ... hundoj. Petro ... trankvila animo restis antaŭ la vendejo kaj ... esperplena koro diris al unu el la policistoj, kiu skribis ion ... krajono: "Sinjoro policisto, mi lerte rompis tiun fenestron ... la ŝtono, ĉu ne?"

"Sinjoro, ne forprenu mian tempon ... nematura ŝerco", respondis la policisto ... severa vizaĝo.

En tiu momento iu ... forta voĉo ekkriis: "Tie kuras la fiulo ... du horloĝoj! Kaptu lin!" La popolamaso rapide forkuris kune ... la policistoj kaj Petro restis sola ... siaj malgajaj esperoj. Kion li faru?

Li faris ankoraŭ malgrandan promenon ... siaj malfortaj kruroj kaj kiam en alia strato li renkontis policiston, li komencis ... la plej malbelaj vortoj insulti la policiston, la registaron kaj la ŝtaton. En tiu momento haltis proksime granda aŭtomobilo ... aktoroj kaj filmaparato. La policisto ... granda trankvileco diris al si mem: Belan aferon ili filmas ... tiu aparato. Mi rigardos tiun filmon ... mia edzino, por ke ŝi vidu min ... tiu ĉi fama aktoro. La aŭtomobilo ... granda bruo forveturis kaj Petro denove restis sola.

Li iris pluen ... malespero. Sed ... larmoj en la okuloj li reiris al sia hejmo kaj decidis ... honesta laboro rebonigi siajn faritajn erarojn. Li direktis sin ... forta volo al la gepatra domo, kiam subite policisto kaptis lin ... fera mano kaj ... laŭta voĉo diris: "Ne estas permesite vagadi tie dum la nokto! Venu ... mi al la policejo! Vi estos punota ... malliberejo!"

Kaj Petro iris! Ĉu li estis feliĉa aŭ malfeliĉa?

Laŭ "La Praktiko" adaptis Dieter Berndt (Germanio)

Kontrolu, ĉu vlaj solvoj ĉiam koincidas kun la nlaj: per forta blovo, kun malgaja koro, per malsekaj okuloj, per siaj frostantaj, kun timo, kun frosto, kun kiu, kun sia familio, per kartludado kun siaj amikoj, per almozpetado, kun samsortaj amikoj, per sia lasta mono,

kun du kolumoj, kun ĉiu komforto, per mono, sed per malbonfaroj, per ĉiuj fortoj, Per la manoj, kun belaj sinjorinoj, per fortaj paŝoj, per duonlaŭta, kun si mem, kun kuraĝo, kun kolbaso, kun legomo, kun kremo, kun minerala akvo, kun la kalkulo, per mallaŭta voĉo, per telefono, kun li per aŭtomobilo, kun kiu, per siaj, per forta puŝo, kun sia granda, kun gumbastono, per siaj lacaj, kun horloĝoj, kun iom, per ambaŭ, kun kolera vizaĝo, kun forta bruo, per aŭtomobilo, kun hundoj, kun trankvila, kun esperplena, per krajono, per ŝtono, per nematura ŝerco, kun severa, per forta voĉo, kun du, kun la policistoj, kun siaj malgajaj, per siaj malfortaj, kun aktoroj, kun granda trankvileco, per tiu aparato, kun mia edzino, kun tiu ĉi fama, kun granda bruo, kun malespero, kun larmoj, per honesta laboro, kun forta volo, per fera mano, per laŭta voĉo, kun mi, per malliberejo.

Resumo pri instruiloj

En 1998, laŭ komisio de la Komitato de ILEI, estraranino Carla de Lorenzi pretigis enketilon por ekscii, kiujn lernilojn uzas niaj membroj. La rezultoj aperis en presita raporto, sendita al sekciestroj kaj reprezentantoj de la Ligo, krome al ĉiu respondinto. Se iu havas korekton aŭ aldonon por tiu verko, bv. sendi ilin (en klare legebla formo!) al la komisiito pri eldonado, Stefan MacGill (adreso, sur la dua kovrilpaĝo) cele al pli kompleta katalogo de instruiloj.

Fakaj retkursoj

Venis al la Komitato de ILEI propono de Hideg Sándor (HU) ke ILEI starigu aŭ aŭspiciu strukturon por reta kursaro uzante Esperanton por instrui plej diversajn fakajn stud-temojn. La Komitato aprobis tiun principon, sed neniu tuj ofertis sin fariĝi ties kunordiganto. Necesus starigi elektronikan bazaron, kune kun ĝiaj lud-reguloj. Tio povus esti en hejmpaĝo de ILEI aŭ aliloke. Al tiu foiro anoncus sin lernemuloj kaj instruemuloj. Tiel, iom post iom kursoj lanĉiĝus. Iuj uzus ekzistantajn kurstekstarojn, en aliaj kazoj la gvidanto kreus tiujn. Tio povos liveri utilan fonton da eldoninda materialo. La proponinto ne havas tempon mem organizi tion, sed volonte akceptos reagojn, proponojn pri studado aŭ gvidado, kaj precipe de iu preta kunordigi la projekton nome de ILEI.
Reagoj al: sxanjicxjo@esperanto.nu aŭ hidegs@drotposta.hu.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, ☎: +32-3-234 34 00.

Redaktejo: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. 🖳: *nlalt@konyvtar.c3.hu* (redaktoro), *smidik@rik.bdtf.hu* (vicredaktoro). Ni ambaŭ povas akcepti faksojn per komputilo, sed avertu nin telefone antaŭ ol vi faksas. ☎: +36-89/ 356-050 aŭ 315-836 (red.) kaj +36-94/ 320-313 (vicred.).

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 31-an de aŭgusto, **redaktofino por la sekva numero: la 31-a de oktobro 1999.**

SEKCIESTROJ de ILEI

Albanio: Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana

Argentino: Teresita Alaníz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral

Aŭstrallo: Jennifer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria AU-3122 🖳: *esperanto@education.monash.edu.au*

Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

Britio: Malcolm Jones, 1 Regent Avenue, Skipton, GB-North Yorkshire BD23 1AZ

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938 🖳: *mmelicharek@iol.cz*

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan 🖳: *zdchen@public.wh.hb.cn*

Finnlando: Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi, 🖳: *raita.pyhala@lestijarvi.fi*

Francio: Marie Malezieux-Hunninck, Grand rue, FR-86410 Bouresse

Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh, Kilián ltp. 75/9, HU-8500 Pápa 🖳: *nlalt@konyvtar.c3.hu*

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran 🖳: *ilei.ir@esperanto.org*

Italio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma 🖳: *m.latorre@uniroma3.it*

Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, JP-181-0001

Katalunio: Pedro M. Martin Burutxaga, Ctra. Estació 2 A-5-2, ES-17300 Blanes, Hispanio 🖳:*pmarti10@pie.xtec.es*

Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb

Kubo: H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana 🖳: *kubesp@ip.etecsa.cu*

Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard 🖳: *ten.hagen.esperanto@wxs.nl*

Norveglo: Björn Thuv, Aröyveien 33, NO-3135 Torod 🖳: *bthuv@c2i.net*

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow

Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara

Ruslo: Irina Gonĉarova, Molocznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000 🖳: *ab2928@mastak.sitek.ru*

Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby 🖳:*bertil.andreasson@horby.mail.telia.com*

Svislando: François Randin, Str. Vallombreuse 14, CH-1004 Lausanne 🖳: *ilei.ch@esperanto.nu*

Togolando: Afantchao-B.Yao, B.P. 20225 TG-Lome

Usono: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US) 🖳:*72644.2450@compuserve.com*

REPREZENTANTOJ de ILEI

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, CL-Séptima Región 🖳:*strigo@ctcreuna.cl*

Danio: *vakas*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 94, EE-3053 Keila

Hispanio: Pedro M. Martin Burutxaga, Ctra. Estació 2 A-5-2, ES-17300 Blanes 🖳:*pmarti10@pie.xtec.es*

Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur

Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv

Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak 🖳: *radp@emi.yu*

Kongo: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, CG-Lukala (Bas-Zaïre)

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José 🖳: *miaumiau@pop.racsa.co.cr*

Koreio: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do KR-499-900 🖳: *so@kns.kangnam.ac.kr*

Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-Wellington 1 🖳:*Sir_Lancelot@compuserve.com*

Portugallo: João Jose Santos Rua da Escola, lote 57 - r/c esq Vale Grande, PT-1675 Pontinha

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana. 🖳:*Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS 🖳: *eugeny@esper.gimli.com*

Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado VE-70782, Caracas 1071 A

***

Noto: *Adreŝanĝojn, petojn pri nericevitaj numeroj kaj simile, bonvolu sendi al la adreso de la Sekretario en Nederlando ne al la presejo aŭ al la Redaktoro.*

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: prez.: Atilio Orellana Rojas (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: Hans ten Hagen, (adreso, kovrilo 3)
Elekta: Doroteo Holland (US), Agneta Emanuelsson (SE), Gwenda Sutton (NZ)
Kontrola: Bertil Andreasson, Märtha Andreasson, Bo Sandelin
Lernej-konkursa: Géza Kurucz, Hitel u.10.fszt.16, HU-6000 Kecskemét, Hungario. Rete: kg@esperanto.nu
Projekto Interkulturo:
Marija Beloševiĉ, Jennifer Bishop, Stefan MacGill, Maŭro La Torre
Regulara: Rob Moerbeek, Hans ten Hagen
Terminara: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando
UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
UNESKO (*en operaciaj rilatoj*). Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 42 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064. La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto.
Kasisto de ILEI: Boo Mee Kim-Linblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>
Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR.
Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: **UEA**, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 37 de Jarlibro 1999. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

Estontaj konferencoj:
2000: 15-21 julio, "Kvinpetalo", Bouresse, Francio (temo anoncota)
2001: Kroatio
ILEI-bulteno: novajoj pri la Ligo: http://esperanto.nu/ileibulteno/index.html
ILEI-hejmpaĝo: bazaj informoj pri ILEI, instruado kaj la projekto Interkulturo: http://www.uniroma3.it/lps/esp/ilei/
Juna Amiko: www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto, <junaamiko@esperanto.nu>
Tendaraj tagoj: www.hungary.net/esperanto/tend-tag.htm *(angla priskribo)*